



SENZACIE

Suno, iĉoj kaj inoj

MEJSA somero influis kelkajn niajn samklubanojn tiel ke ili forte ekamis aŭ ekmalamis la Sunon. Nome, la 30an de septembro okazis ke Ana dum la festo pri komenco de la akademia jaro en sia prelego tre serioze (laŭ opinio de Dalibor) ofendis la Sunon kaj la tutan viran populacion. Pro tio li la sekvan semajnon volis fari respondprelegon, sed ĝi ne okazis pro maltroa ĉeestantaro. "Mi havas informon ke la bojkoton organizis

sekreta 'Kontraŭsuna kaj Kontraŭiĉa Organizo'", diras Dalibor, "sed mi batalos kontraŭ ili nur perargumente." La sekvan semajnon la prelego tamen okazis, sen iaj ajn incidentoj. Ana tuj anoncis sian baldaŭan respondon, sed ne precizigis la daton. Temperaturo en la klubo kreskas kaj la fino estas neantaŭvidebla. "Koboldo" atente observos kaj informos vin pri daŭrigo de la okazaĵo. Legu jam en la sekva "Koboldo"!

utile kaj interese

Kaptu la plej grandan!

Longdaŭra observado de la vivo de "Blata Societo" en La Tria Ĉambro finfine donis rezultojn. Nome, d-ro Ikoso, kiu gvidis la esplorgrupon, nun disponas pri spaca distribuo de blatoj depende de diversaj ecoj - grandeco, kolornuanco, ktp. Nun do oni povas scii ke,

ekz. probable trovi grandan blaton sur la dekstra tablo meze de la Ĉambro estas 98% (se unu homo eniras ĉambron kiu estis mallumigita), kaj sur la plej dekstra tablo 98.7% je samaj kondiĉoj. Se vin interesas kiel kapti aŭ eviti blaton, havigu rezultojn de la esploro - vi ne bedaŭros.

Prezidantece

Mea...

La naŭan de oktobro okazis en la tria ĉambro kunsido de SEK estraro. Nia kara prezidantino sukcesis dum la okazo frakasi vitran tablon kiun oni uzas por paĝo-montaĵo. Kio fakte okazis restos por ĉiam sekreto-iuj asertas ke ŝi subite komencis danci sur la tablo, dum aliaj diras ke ŝi ege furioziĝis pro malbonaj monpetoj kaj volante frapi iun estraron hazardo frapis la tablon. Ĉiuokaze, la rezulto ankoraŭ videblas en la tria ĉambro, interalie pro tio ke la estrino pro iaj misteraj kialoj ne volis forigi vitrerojn sed ŝi kolektis kaj lokigis ilin sur la apudan tablon. Hazarde ĉeestanta S. Ŝimec, konstatante ke ŝi ekspektis tion kio okazis, aldonis ke la sama afero okazis antaŭ certa tempo, kaj ke homo kiu faris tion mortis post kelkaj tagoj. Estu atentema, kara nia Meja!

Krucvortnigmo

Ĉi tie desegnu mem kvadraton kies dimenzioj estu 5 oble 5




EN AMBAU DIREKTOJ:

1. Produktas, estigas.
2. Tro ŝpareme.
3. Perforte forprenos.
4. Delikata odoro.
5. Egalaj numeraloj.

Porkomencanta angulo

parteto el premiita novelo de Georgo Kamaĉo
Kia la semo

Antaŭ miaj okuloj baraktis eta ortoptero, ido, nome manto, lausekse mantiĉo. Kial mi ne povis rekoni, klasi lin unuavide? Nu, tiun mantiĉon mutacio ~~e~~formis, difektis: lian kriple nanan torakon kun atrofiataj flugiloj kronis enorma kapo, aĉa kaj turpa, dum, malantaŭe, lia abdomeno, kun saltopretaj postaj membroj,



ekspoziciis kolosan elstarajon, titanan apendicon, ciklopan muskolegon simbolantan vilendorfan genervivon. Mirigis min, ke lia korpo ne verdas, sed prezentas koloron plej similan al forpuŝa kaj nauza ekimozo. La monstra insekto vekis kompaton en mi... Mi baptis lin Priapo.

TEATRE

SEK profesiiĝas

Teatra grupo de SEK post brila, grandioza sukcesego en Germanio (la aktoroj fuŝis nur kvar foje dum dancoj, unufoje forgesis tekston, kasedo ĉesis funkcii meze de la prezentaĵo kaj unufoje la lumigisto konfuziĝis) kie oni prezentis skeĉojn dudek ĝis tridek jarojn agajn kaj post du premieroj ĉi jare (la unuan fakte oni ne prezentis ĉar mankis aktoroj) decidis tute profesiiĝi. Nome, de IS organizantoj la teatra grupo postulis grandegan honorarion, aŭ la teatraĵo ne estos prezentita! La

grupanoj certigis ke ili ne rezignos pri sia postulo-ĉiuj ja scias kiom valoras Teatra Grupo de SEK. Por montri kiom seriozaj ili estas, ili ne nur ne komencas prilabori la novan teatraĵon, sed eĉ ne volas surpaperigi tekston, antaŭ ol ricevi la pagon. Se vi tamen deziras ekscii pri kia teatraĵo temas, senhonte venu al Kate, la autorinon, kiu volonte detale kaj entuziasme rerakontos sian cerbumprodukton. Anaŭ ol fari tion, tamen enkapigu ke tio dauros kelkajn horojn. Kaj ne miru se la versio rakontita al vi diversas de tiu rakontita al via amiko-tiaj ja estas artistoj.

lingva angulo-vortareto

piĉo (ĵar) vulvo, virina seksorgano
piĉjo vd. piĉo
pipinjo (Neo) piĉo karese

kaco (ĵar) penis
kacingo kondomo
kacujo pantalonfando

Fino de la unua koboldo...Facon kaj egalrajtecon deziras al vi via redaktoro